

En la artikolo (Scienca Revuo, Vol. 12, 1—2) »La vortspecoj de la subjekte predikativo...« estas montrita, ke ĉe la emfazo de la subjekta infinitivo aŭ propozicio per **tio** la predikativo alprenas la adjektivan formon kaj ke la forprenado de la emfazo ne ŝanĝas tiun formon. Por alimaniere pritrakti la demandojn oni povas pensi subkomprenita iu konvena substantivo, kio motivigas kaj eĉ postulas adjektivon kiel predikativon. En la ĉi subaj citatoj de Zamenhof estas interkrampoj kiel ekzemploj metitaj tiaj subkomprenitaj vortoj.

»Sed la plej bela kaj mirinda (surprizo) estis por ŝi, ke la floroj supre sur la tero odoras« (Krestomatia 37/11)

»Sed la plej bela (revo) estas ŝi diris, kuŝi en la lumo de la luno«. — — — (Krest. 38/11)

»Ŝajnas al mi, ke la plej bona (arango) estus, se tiun ĉi raporton eldonus Vi — —« (Leteroj de Z. I. 179/16, 28. 8. 1905.)

»— — — la plej bona (maniero) estos, se ni publike tute silentos pri la decido de la Delegacio — —« (L. de Z. 51/44, 27. 10. 07)

»Plej bona (sinteno) estos, se vi ĝin forgesos!« (Haml. Akto I, Sceno 5)

»Ĉu ne estas ebla (procedo), ke ni komprenigu al per alia lingvo?« (Haml. Akto V, Sceno 2)

»Tial mi nun demandas min, ĉu estas efektive necesa (ago), ke mi entreprenu nun mian intencitan vojaĝon«. (L. de Z II 61/13 1. 11. 07)

»— — estus tre utila (metodo) tute precizigi kaj klarigi la rolon de la Oficejo«. (L. de Z. II. 285/24 8. 2. 11)

411 : 408.92

POR FACILE KOMPRESNI FAK'TERMINOJN EN E'O

(A. LIENHARDT, Muhlouse, Francujo)

- 1 Okaze de la verkado kaj reviziado de teknikaj fak'vortaroj en E'o (= mallongigo por la nomo Esperanto), la subskribinto spertis, ke terminoj, konsistantaj el pluraj vort'elementoj kunmetitaj, ofte estas malfacile kompreneblaj fare de novaj Esperanto-uzantoj.
- 2 Por atingi maksimuman kompren'eblecon de tiaj terminoj — ankaŭ fare de instruoj, kiuj ankoraŭ ne lernis la internacian lingvon E'o — estas konsilinde klare vidigi la ĉefajn unuopajn vort'elementojn pere de la sistemo jen montrata:
 - 2.1 Post komplete vort'elemento, troviĝanta en kunmetita fak'termino, oni metu disigan streketon (—).
Tio estas regulo jam konata kaj uzata de multaj aŭtoroj en diversaj okazoj.
 - 2.2 Post nekomplete, eliziita vort'elemento (t. e. aperanta sen la fina vokalo o aŭ a aŭ e), oni metu apostrofon (').
Tiun skrib'manieron jam uzis D,ro Zamenhof en la »Universala vortaro« aldonata al »Fundamento de Esperanto«.
- 3 Jen kelkaj praktikaj ekzemploj por klarigi la ĉi-supre menciitan koncepton:
 - 3.1 Fak'vortoj kun disig'streketo:

aero-premo (premo de la aero), akso-rompiĝo (rompiĝo de akso), amoniako-gazo (amoniaka gazo), arko-mezuro (mezuro de la longeco de arko), bombo-atako (atako per bomboj), ĉokolado-fabriko, oleo-ekflamiĝo, trajno-anoncado, primara (pri la maro, ne primara nombro), per-labori (atingi per laboro), pro-porcio (rilata al porcio, ne al proporcio), k. a.

3.2 Fak'vortoj kun apostrofo:

maŝin'fako (fako pri maŝinoj), agad'centro (centro por agado), pasaĝer'elirejo (elirejo de pasaĝeroj), virin'informejo (informejo por virinoj, anstataŭ »virininformejo«), aer'prem'mezurado (mezurado de la aer'premo, aŭ de la aero-premo), vagon'aks'rompiĝo (rompiĝo de vagon'akso, aŭ de vagono-akso), amoniak'gaz'sintezo sinteza fabrikado de amoniako-gazo), parabol'ark'mezuro (mezuro de parabola arko), k. a.

3.3 Fak'vortoj kun disig'streketo kaj apostrofo:

fak'gazeto-artikolo (artikolo en fak' aŭ en faka gazeto), elektro-motor'difekto (difekto de elektra motoro), haven'dogano-inspektoro (inspektoro en haven'dogana oficejo), dom'interno-arkitekto (arkitekto pri interna instalado de domoj); krome la jam konataj vid'al-vide, man'en-mane, brak'sub-brake, k. s.

*

* *

4 Estas okul'videble, ke la ĉi-supre montritaj ekzemploj estas iom arbitre art'faraj; tio estas nur por klare illustri la prezentan tezon. En la praktiko estas konsilinde apliki la sistemon kun racia mezuro, ĉar ankaŭ tie — kiel ĉie — troigo estus malbono. Tamen, ektser la kampo de fak'vortaroj, estus dezirinde prezenti E'o—tekstojn sammaniere en lego-libroj por komencantoj kaj progresantoj; tio certe helpus multe al ĉi tiuj por kompreni rapide, la lego-pecojn, kaj tiel konfirmos la aserton ke E'o estas facile lernebla lingvo.

406:408.92

REKOMENDO

DE LA AKADEMIA SEKCIO POR TEKNIKAJ VORTAROJ PRI LA ESPRIMADO DE KVANTAJ, NOMBRAJ KAJ MEZURAJ INDIKOJ KAJ DE PROPORCIOJ DE UNUOJ

Pri ĉi tiuj problemoj okazis vigla diskutado, unue en la Elektroteknika Sekcio de ISAE (inter s-roj Siwicki, Korpela, Warner, Van Gompel kaj Haferkorn), poste — surbaze de resumanta Studo de Haferkorn — inter kelkaj membroj de la Akademio (Waringhien, Kalocsay kaj Albault).

La afero nun estas sufiĉe zorge pritraktita. Jen la rezulto de la komentoj de la lastnomitaj Akademianoj, kiu estas akceptebla ankaŭ de niaj teknikaj fakuloj kaj kiun ni volas publikigi ĉi sube kiel »Rekomendon de la AKADEMIA SEKCIO POR TEKNIKAJ VORTAROJ«:

1) Kvantaj, nombraj kaj mezuraj indikoj

Prefere ni uzu la prepozicion »da«, ekz-e

glaso da akvo; dekduo da pomoj; unu kilogramo da teo; da ĉevaloj ili havis 36; 60 paĝoj da teksto; mil ŝilingoj da konstanta mono; da saldo, ktp.

Tamen ni tute pravas ankaŭ diri:

Sumo de 50 liroj; altensia linio de 100.000 voltoj; distanco de 75 metroj.

Same korekte estas uzi la akuzativon jene:

La riverego estas mil kilometrojn longa; la monto estas 300 metrojn alta.

Kaj laŭ la Plena Vortaro, tria eldono, p. 296 sub »longa« oni ankaŭ rajtas diri jene:

La monto estas alta je trimil metroj, kaj laŭ tio ankaŭ: La riverego estas longa je 1000 kilometroj.